

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale  
PLENUMITA 20/02/2020 Kvarcentseksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Entute **729,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **279,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **242,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)


Nun studas **208,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

### Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro.108

Ofte kompleta frazo havas Predikaton kun pli da vortoj ol la simpla Verbo. La ĉeffrazo havas kiel kernon iun Verbon kun unu el nur la finaĵoj -is, -as, -os, -us, aŭ -u. Notu ke la Predikato povas enhavi Infinitivojn kaj Predikativon. Serĉu la eventualan Gramatikan Objekton de la ĉefpredikato kaj la eventualajn Adjektojn. La kerno de la Objekto povas esti nur Substantivo aŭ, malofte, Infinitivo, aŭ, tre malofte, Adverbo. La Adjekto povas esti nur Adverbo aŭ Prepozitivo aŭ Akuzativo. Vi ankoraŭ ne havas la Komplementojn, kiuj ja faras la kompleksan frazon tiom komplika. **Marcel Leereveld.**



### La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo

atendos vin. La 15a de Februaro estis la tria sabato. Venis Roger Springer, Chris Holliss John Casey kaj Ian Wylles



**Roger Springer**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## Ĉu manĝbastonetoj kreskas en mia ĝardeno?

### BONAJ NOVAĴOJ !

Estas bona, legi en la ĵusaj A. E. -oj pri la Esperantaj sukcesoj en Adelajdo kaj Brisbano, kaj pri la sukcesoj de Rainer Kurz invitati de pluraj Rotario-kluboj. Paroladoj en Rotario kaj aliaj kluboj estas tre utilaj, kvankam la nombro da rotarianoj eklernantaj Esperanton estas tre malalta, ĉiam estis. Eble la psiĥologia tialo estas, ke ili timas ekinteresiĝi pri Esperanto ĉar ili tiom uzos tempon kaj interesiĝon por Esperanto, ke ili forgesos labori pri rotariismo. Sed ili ne bezonas timi tion, ĉar ekzistas internacia Esperanto-grupo en Rotario. Aŭ eble ili ne favoras Esperanton, ĉar ili trovas ke la angla sufiĉas por ili en internaciaj rilatoj. Ja nature la rotarianoj en neanglaj landoj estas tiuj kiuj lernintas la anglan. Aŭ al ili ne gravas, ke la angla estas tro malfacila por lerni ĝin perfekte. Kaj eble ili ne konscias pri tio, parte pro la fluparolado de Rainer en la angla. Cetere, ĉu Aŭstralio estas la dua hejmo de Rainer?

**Marcel.**

### GRAMATIKA KVIZO .

Penu la ĉisuban kvizon respondi ĝuste (NE "korekte", ĉar ne korektu la demandojn!). La respondoj troviĝos sur sekvanta paĝo. (Ne ĉagrenu, se vi tro malsukcesos en la kvizo, ĉar eĉ en Melburno la klubanoj, inter kiuj universitata lingvisto, malsukcesis en plej multaj respondoj):



**1).** Kiel en Esperanto oni tuj vidas, ke vorto estas verbo? **2).** En kiu verbtempo Zamenhof montris, ke unu ago reprezentatas de unu verbo? **3).** Kion signifas "manĝanta" kaj "manĝata"? **4).** Kiuj estas la kvar gramatikaj voĉoj? **5).** Per kio la verboj diferencas en la kvar gramatikaj voĉoj? **6).** Kiom da agoj okazas en la kvar voĉoj de la frazo "Mi skribis la leteron hieraŭ"? **7).** Kiom da verboj uzatu en ĉiu el la kvar voĉoj de la frazo "Mi skribis la leteron hieraŭ"? **8).** Kion Zamenhof uzis por la verbo en la Pasiva Voĉo? Kaj kial? **9).** Kiu simpla verbo haveblas por fari la Pasivan Voĉon? **10).** Pro kiu regulo la sufikson por fari la simplan Pasivan Voĉon la verbo rajtas uzi sen la signifo de tempo aŭ de nefiniteco? **11).** Pro kiuj du tialoj oni ne rajtas uzi (malgraŭ Zamenhof) por la pasiva voĉo la formon "(La letero) estas/is/os/us/u skribata"? **12)** Kiu estas la gramatika nomo por la formoj "estas manĝanta" kaj "estas manĝata"? **13)** Kiu komencis uzi la sufikson "-ati"? Kiu fama (la plej fama) Esperantologo diris ke (en lia tempo) Esperanto ne havas propran Pasivan Voĉon?

Kunmetitaj de **Marcel Leereveld.**

### ĈU ROGER PRAVAS PRI BASTONETOJ ?

Mi opinias, ke li certe pravas, ke manĝi per bastonetoj estas malpli higiena ol manĝi eŭrope, kaj certe povas kaŭzi pli da koronavirusoj en Ĉinujo, kaj aliaj aziaj landoj. Sed pli kaŭzis rapidan plimultiĝon en Ĉinujo la diktaturo de la lokaj registaraj instancoj kiuj malpermesis la publikan medicinan komunikadon kaj avertojn. En pli libera lando la viruso estus rekonata kaj kontraŭbatalata pli rapide. Cetere ankaŭ la kulturo de la eŭropanoj

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

kulpas pri pli rapida transirado, pro ilia malhigiena kutimo saluti per manpremo: la homa mano havas centfoje pli da mikroboj ol la surfaco de strato. Kaj plie: mi ricevis pasintan jaron, laŭ la hospitalaj kuracistoj, la tiam en Aŭstralio tute ne ekzistantan eŭropan gripon, ĉar mi vangokisis eŭropan vizitanton. Kaj ekspertulo klarigis antaŭ kelkaj tagoj, ke la plej bona maniero eviti la koronaviruson estas ofte lavi la manojn, se necese dudekfoje ĉiutage, kaj ĉiam post kiam oni permane tuŝis fremdan aĵon, inkluzive de la manstangoj en tramoj kaj vagonaroj kaj busoj. Tial mi ne vojaĝas per publika transporto antaŭ ol oni trovis ĉiujn en Viktorio kiuj portas la viruson. Kaj se mi devas viziti



koncertejon por vidi operon, mi surhavas gantojn, kaj forĵetos ilin, ĉar mi certe ne postvivis la koronaviruson: jam lastan jaron oni trovis miraklo ke mi postvivis la tre fortan eŭropan gripon. Ankaŭ facile transmetanta estas la aŭstralia kutimo (kulture malpermesata en Nederlando) porti tason de trinkaĵo al vi tenante la tason ĉe la rando.

**Marcel Leereveld.**

## PARTICIPAJ ADVERBOJ .

La diferenco inter participaj adverboj kaj la aliaj adverboj estas, ke la signifo enhavas la tempon kaj la voĉon de la necesa ago en la radiko, kiu do devas esti verba: FALante; NUTRote. Krome ke la verba parto povas ĉehavi siajn normalajn komplementojn, kiuj sekve estas komplementoj de la participa adverbo: Ĉiun matenon la kokinojn NUTRANTE kaj Ĉiun matenon de la edzino NUTRATE. Tion oni ne povas fari ĉe neparticipaj adverboj, do ne “Li pasas la tempon librojn legeme, kvankam oni kelkfoje renkontas frazojn kiaj Li dikiĝis sukeraĵon manĝeme, kaj Ĉar de homoj nemanĝeble forĵetataj.

En la frazo la adverbo plej ofte funkcias kiel adjekto, kaj do tiel difinas la agon, la verbon, la predikaton, kiel en “Li perdis sian tempon drinkANTE” kaj “La pluvo venis neatendITE”. Kaj kun komplementoj: “Li perdis sian tempon drinkante VISKION EN LA DRINKEJO” kaj “La pluvo venis DE NI TUTE NE atendite”. Oni devas atenti, ke eventuala komplemento povas difini AŬ la participan adverbon AŬ alian parton de la frazo, kiel ekzemple en “La reĝo venis neatendite de la urbo”. Ĉu la urbo ne atendis la venon aŭ ĉu la veno estis de (= el de) la urbo? En la dua kazo pli bonas diri “Neatendite la reĝo venis de la urbo”, kaj por la unua kazo “De la urbo neatendite la reĝo venis”.

Pli malofte la adverbo estas komplemento de iu frazparto, kiel en “La kokinoj ne nutrite dum kelkaj tagoj produktis malpli da ovojn”, kaj “La infano, ne dorminte dum la nokto, estis tre laca”, (subjekte), kaj “La sonoj estis penetrante akraj” kaj “La aŭtomobiloj restis varmigite malrapidaj”, (predikative), kaj “Ŝi manĝis la glaciaĵon fandante en sia mano”, (objekte).

Ĉiuj participaj adverboj estas transformeblaj al iomete pli longaj subfrazoj. Fakte tion oni ĉiam faras en la parolataj lingvoj etnaj, eĉ la angla, kaj en Esperanto. Oni do devas koni ilin nur por kompreni ilin en la skribita lingvo. Ekzemple oni skribas “Lavante miajn manojn, mi uzas sapon”, sed oni diras “Kiam mi lavas miajn manojn, mi uzas sapon”. Lingvisme estas stranga tiu duforma uzado. Eble la homoj pensas, ke per la participaj adverboj la lingvo fariĝus tro mallonga por pensi ĝin. Oni ja konstatas, speciale en la angla, ke kie la lingvo fariĝas mallonga, oni aŭtomate kreas pli longajn esprimojn. Ekzemple en la angla, kie la

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**





## Mi vizitis Manilon ( Filipinoj)



Mi vizitis Manilon ( Filipinoj) de la 1a ĝis la 4a de februaro 2020 kun la celo renkonti Albert Garrido, kiun la aŭstraliaj esperantistoj renkontis kadre de la kongreso en Bekasi, kaj la lokajn esperantistojn.

Mi eksciis ke okazos kongreso en Manilo de la 23a ĝis la 26a de aprilo en la universitato Diliman en Manilo. Estas oportuno kaj subteni la tieajn esperantistojn, preskaŭ ĉiujn junulojn, kaj malkovri alian parton de la mondo se vi ankoraŭ ne vizitis la insularon de Filipinoj



Amike,

**Franciska Toubale**

## La Klubo

<http://aea.esperanto.org.au/local-groups/>

**Brisbane Esperanto-Societo** Petro Danzer Tel: 0402 766 557

Retpoŝto: [brisbane@esperanto.org.au](mailto:brisbane@esperanto.org.au)

**Central Coast and Newcastle Esperanto Club** Joanne Cho Tel: 0413 087 340

Retpoŝto: [centralcoast@esperanto.org.au](mailto:centralcoast@esperanto.org.au)

**Esperanto Coffee Club of Canberra** Huigh Malcolm Tel: (02) 6288 4334

Retpoŝto: [canberra@esperanto.org.au](mailto:canberra@esperanto.org.au)

**Esperanto Federation of New South Wales** Tel: (02) 9319 4775

Retpoŝto: [nsw@esperanto.org.au](mailto:nsw@esperanto.org.au)

**Esperanto in South Australia** Indrani Beharry-Lall Tel: (08) 8285 3128

Retpoŝto: [sa@esperanto.org.au](mailto:sa@esperanto.org.au)

**Esperanto League of Western Australia** Shayne Power Tel: (08) 9343 9532

Retpoŝto: [esperantowa@hotmail.com](mailto:esperantowa@hotmail.com)

**Manly Esperanto Club** Roger Springer Tel: (02) 9976 6320

Retpoŝto: [manly@esperanto.org.au](mailto:manly@esperanto.org.au)

**Melbourne Esperanto Association** Heather Heldzingen Tel: (03) 9525 4295

Retpoŝto: [melbourne@esperanto.org.au](mailto:melbourne@esperanto.org.au)

**Tasmanian Esperanto Society** Kam Lee Tel: (03) 62251474

Retpoŝto: [tas@esperanto.org.au](mailto:tas@esperanto.org.au)

**Torquay Esperanto Coffee Club** John Adams Tel: (03) 5261 2899 / 0421 043 272

Retpoŝto: [torquay@esperanto.org.au](mailto:torquay@esperanto.org.au)

**Tuvumba Esperanto-Societo** Hazel Green Tel: (07) 4691 1238

Retpoŝto: [toowoomba@esperanto.org.au](mailto:toowoomba@esperanto.org.au)

Se informon pri via klubo mankas aŭ eraras informu min. **Roger Springer** [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**